

Ĉeĥdevenaj kristnaskaj kantoj

České vánoční koledy v překladu do esperanta

Pro naskiĝ' de Kristsinjor' (*Narodil se Kristus Pán*)

1. Pro naskiĝ' de Kristsinjor' ni ĝojegu, pro la Dia roza flor' gajo regu.
/:El virgina sino, reĝa origino, al ni sendis lin Di:./
2. Elaĉetis sin homar', ni ĝojegu, pro la Krista sava far' gajo regu.
/:El virgina sino, rega origino, al ni sendis lin Di:./

Kantis patrino al filet' (*Chťíc aby spal*)

1. Kantis patrino al filet' plej amata,
dormo alvenu al knabet' adorata.
Songu , ho rava infanet', Dia filo,
songu kviete, rozflorete', en lunbrilo.
2. Por vi dormlokon sternis mi, ho Savanto,
ĉiujn alvokis laŭdi vin, Mondkreanto.
Dormu plej dolĉe, en trankvil', Jesueto,
gardos mi songon vian ĉe la kripeto.

Aŭdu, aŭdu (*Slyšte, slyšte, pastuškové*)

1. Aŭdu, aŭdu, ho paŝtatoj, kiaj sonas novaj kantoj
/:en malfrua nokta temp' ĉe la grot de Betlehem':./
2. La anĝeloj tie aperas, laŭdan kanton ili oferas
/:al ĉiela la infan' sur la fojno en la stal':./

Gloran novaĵon ni portas al vi (*Nesem vám noviny*)

1. Gloran novaĵon ni portas al vi el Betlehemo, jen aŭdu pri ĝi!
/:Aŭdu ĝin plene, senmiskomprene:/, pensu pri l' sci'!
2. Naskis fileton en nokta malbru' Pura Virgino al mondo por ĝu',
/:Dia sendito estas la ido:/ Kristo Jesu'.
3. De sur ĉielo eksonas fanfar' kantas jubile en alt' anĝelar'
/:Di ke nin benis, mondon ke venis:/ sav' de homar'.

Ek, ho fratoj (*Hore bratři*)

Ek! Ho fratoj, ekleviĝu vi! Hastu tuj al Betlehemo ni!
La donacojn al Jesu' portu tra la noktmalbru', ĝoje al li ludu tiel ĉi.
/:Dudlaj dudlaj dudlaj da:/ - ĝoje al li ludu tiel ĉi.

Kion signifas (*Co to znamená medle aj nového*)

1. Kion signifas tiu brila helo?
Longe ne estis tia la ĉielo!
Jen belege brilas lun' per bonaŭguranta lum'
Kantas per dolĉa voĉo anĝelar'.
/:Kante ili gloras Dion en ĉiela alt'!:/
2. Rave ekkantas nokte la birdetoj,
klare eksonas ĉie korn-trumpetoj.
La unua estas foj', ke ekregas tia ĝoj'!
Kantas per dolĉa voco anĝelar',
/:kante ili gloras Dion en ĉiela alt'!:/.

En Betlehemo, en Betlehemo (*Aj, tam v Betlémě přešťastná novina*)

1. En Betlehemo, en Betlehemo regas ĝoj' sen fino,
ke Dian filon, ke Dian filon naskis Virgulino.
Refreno: Krist' mondon venas, homaron benas,
anĝeloj ludas, reĝoj salutas,
paŝtistaro festas, bestoj genuestas,
tuta mondo manifestas.
2. Maria Virgo, Maria Virgo la knabeton vartas,
sankta Jozefo, sankta Jozefo flege lin prigardas. *Refreno*

Festa Kristnaska Vigili' (*Veselé vánoční hody*)

1. Festa Kristnaska Vigili', gaje, infanoj, kantu ni
/:ke naskiĝis en realo al du homoj en la stalo infanet'!:/.
2. Li estas Di' en homa korp', enkorpiĝinta Dia vort',
Dia fil' kaj fil' de homo, el plej povra stala domo Mond-Savont'.

Ŝafojn paŝtis en la val' (*Pásli ovce valaši*)

1. Ŝafojn paŝtis en la val' betlehema paŝtistar'.
Hajdom hajdom tidlidom-4x.
2. Sendis ilin mem anĝel' laŭ la bril' de granda stel'. Hajdom ...
3. Tie en plej povra stal' Sav' naskiĝis al homar'. Hajdom ...

Jen venis al ni Tag' de Glor' (*Den přeslavný jest k nám přišel*)

- Refreno:* Jen venis al ni Tag' de Glor', longe ĝi restu en la kor',
/:ĝojegu ni kaj gaju ni en la Nova jaro!:/.
1. Estu benata tuta dom', en ĝi feliĉu ĉiu hom',
rikolto bona trafu vin, regu ĉie amo. *Refreno*
 2. Kantos ni kune por moment', flugu for tristo kaj lament',
per vin', biero tostu ni, do je via sano! *Refreno*